

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Surkampare iĝas
ree nun vesper',
milde subeniĝas²
paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas
rivereta flu',
kaj la akvo fluas
ĉiam, ĉiam plu.

Ne haltgis iu
ĝin je l' tagofin',
kaj vesper' neniu
ripozigas ĝin'.

Mia kor', senlace
strebas ankaŭ vi,
vi ripozas pace,
nur se volos Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-644-1299 (2014-04-23 17:10:27)

²aŭ:
pac' malsupreniĝas
milde de l' eter'.